Universala Esperanto-Asocio

**AKTIVULA MATURIGO**

Estrara Subteamo: MOVADO

Al: Landaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne), Fakaj Asocioj, la Komitato, Konsilianoj, ILEI, TEJO, listoj kaj unuopuloj

EKO 2014-2

## Seminario pri AMO, numero 1

Tiu okazos de la 22a ĝis la 24a de marto, 2014 en Horány, en apudrivera centro sur insulo en Danubo ĉ. 40 km. de Budapeŝto. Ĝi okazos kun du komunaj tagoj kun Junulara Esperanto-Renkontiĝo (JER), renoma aranĝo de la Hungara Esperanto-Junularo (HEJ). Vidu informojn pri la ejo, atingeblo, kostoj kaj aliĝo kaj la JER-programo ĉe www.jer.hu. Resumo de la seminariaj sesioj aperas post la programo.

Jen la programo por la Seminario Pri Aktivula Maturigo (SPAMO) 1:

Ĉeftemo:

**Kiel komuniki efike?**




### *Vendrede la 21an de marto (sunleviĝo 05.45, subiro 18.00h)*

Ekde 16.00h Alveno, registriĝo, interkona vespero laŭ la programo de JER.

### *Sabate la 22an de marto*

09.00- 09.30 Malfermo de la seminario kun koncizaj prezentoj de la gvidontoj.
09.30-10.00 Superrigarda prezento 'Kiel labori internacie' (Stefan MacGill – SMG).
10.00-10.30 Dek sin-prezentoj, rigore po 3 minutoj de elektitaj antaŭanoncintoj pri partoprenatendoj de la seminario kaj/aŭ skizo de ilia pritema agado aŭ bonaj pritemaj ideoj.

11.00- 12.30 Veronika Poór (HU): Kiel organizi lokajn grupojn.

14.00- 15.30 Orlando Raola (US): Kiel provizi kialojn por lerni Esperanton?
16.00- 17.00 Lu Wunsch Rolshoven (DE), enkonduko: Kiel prepari gazetarkomunikojn.
17.15- 18.15 Petro Baláž (SK), enkonduko: Modernaj komunikaj rimedoj.

### *Dimanĉe la 23an de marto*

09.00- 11.00 Petro Baláž: Modernaj komunikaj rimedoj.
11.30- 12.30 Veronika Poór: – Kiel organizi lokajn grupojn (2)

14.00- 15.30 Lu Wunsch Rolshoven: pri gazetarkomunikoj kaj rilatado kun ĵurnalistoj (1)
16.00- 17.00 Panel-diskuto (panelo: gvidantoj plus pliaj). Temo: Elstaraj kaj malaj ekzemploj de nia uzo de komunikaj teknikoj.
17.15- 18.00 Resumoj de forirontoj.

### *Lunde la 24an de marto*

09.00- 10.30 Stefan MacGill: Kiel kabori internacie? Kun rolludo ‘Azanio’.
11.00- 12.30 Lu Wunsch Rolshoven pri gazetarkomunikoj kaj rilatado kun ĵurnalistoj (2)
14.00- 15.30 Veronika Poór – Kiel organizi lokajn grupojn (3)
15.40- 16.15 Resumoj, konkludoj, planado por aperigo de gvidiloj, raportoj, registraĵoj.

## LA PROGRAMO SUPERRIGARDE

| | SABATE | DIMANĈE | LUNDE |
|---|---|---|---|
| 9.00 -10.30* | Malfermo; SMG; Dek sinprezentoj. | Petro Baláž | SMG kun rolludo |
| 11.00- 12.30* | Veronika Poór | Veronika Poór | Veronika Poór |
| 14.00 – 15.30 | Orlando Raola | Lu Wunsch Rolshoven | Lu Wunsch Rolshoven |
| 16.00-17.00 * | Lu Wunsch Rolshoven | Panel-diskuto | Konkludoj |
| 17.15-18.15 * | Petro Baláž | Resumoj | -- |

* La tempoj iom aliaj de tago al tago. Vidu supre.

# RESUMOJ DE LA GRUPOJ

Ni memorigas vin, ke la sesioj estos partoprenigaj. Post prezento de la ideoj de la gvidantoj sekvos ekzercoj, diskut-grupoj aŭ rolludoj, en kiuj la partoprenontoj povos aktive kontribui kaj montri siajn problemsolvajn lertojn. Do, ideo- kaj sperto-interŝanĝoj estas antaŭvidataj tra la sesioj.

**Veronika Poór (HU - sesioj ĉiutage ekde 11.00 atm)**

## Kiel organizi lokajn grupojn

Loka agado konsistas el tre diversaj kaj malfacilaj taskoj, kiel varbado, grupkreado, grupgvidado, instruado, administraĵoj, kunligo kun la internacia movado. La celo de la trejnado estas konsciigi pri la diversaj bezonoj de la lokaj grupoj kaj krei internaciajn kunligojn por subteni efikan lokan agadon. Dum la du trejnsesioj tra interŝanĝoj, praktikaj individuaj kaj grupaj taskoj ni lertiĝos kiel transsalti la kelkfoje tre altaspektajn barilojn de loka agado.

**Orlando Raola (US - nur unu sesio en la seminario)**

## Kiel provizi kialojn por lerni Esperanton

En la agado por disvastigi Esperanton kaj varbi novajn homojn por ĝia lingva komunumo, ofte aperas la demando: Kial mi lernu la lingvon? Homoj lernas pro diversaj kialoj, kiel oni montras ekzemple en la filmeto: “Esperanto estas…”. La plej grava kialo lerni la lingvon estas la spirita pliriĉiĝo kiun ĝi donas. Homoj kiuj dividas tiun ĉi ideon estas forte motivitaj kaj neniam pridubas la agon lerni. Tamen, restas la ceteraj. Estas relative malfacile konvinki nuntempan praktikemulon, ke li aŭ ŝi lernu kaj ekuzu la lingvon. Utilas al esperanto-aktivuloj havi klaran ideon pri la eblaj motivoj por ke ili povu reagi konvene, depende de ĉies specifaj interesoj kaj karakterizoj, por helpi al ili trovi certecon kial dediĉi tempon/monon al lernado de la Internacia Lingvo.
Ni esploros la sekvajn motivojn:

- Por aniĝi al unuspeca internacia lingva komunumo
- Por vojaĝi al Esperantolando (bonvolu ne serĉi ĉe Google-mapoj)
- Por ĝui tradukitajn literaturajn verkojn
- Por sukcesi en lernado de fremda lingvo
- Por doni alternativan vojon al tiuj kiuj jam decidis, ke ili ne volas vivi en mondo unulingva (legu anglalingva)

**Lu Wunsch-Rolshoven (DE – enkonduko plus du sesioj)**

## Pretigi gazetarajn komunikojn kaj rilati kun ĵurnalistoj

Se ni volas "disvastigi la uzadon" de Esperanto – la unua laŭstatuta celo de UEA – ni devas informi la eblajn lernontojn kaj uzontojn pri nia lingvo kaj ĝia hodiaŭa uzado. Ili havu la bazon por decidi, ĉu lerni (aŭ ne lerni) nian lingvon (ĉefe temas pri junuloj inter 14 kaj 25 jaroj). Unu el la plej efikaj manieroj de informado estas zorgi pri publikigoj en gazetoj ekster kaj en la reto, en radio kaj televido. Oni ofte atingas plurajn mil homojn per ĉiu unuopa laborhoro.

- Ni lernos kiel verki gazetaran komunikon, kiel kaj kiom ofte oni kontaktu amaskomunikilojn kaj ĵurnalistojn (pli ofte ol oni ĝenerale kredas); ni trejnos la interparoladon kun ili.
- Ni priparolos, kiun enhavon pri Esperanto ni prefere transdonu por eviti postajn negativajn prezentojn; mia konsilo: Prezentu la nunan realon, kiu estas videbla kaj palpebla, ne asertojn kaj revojn por morgaŭ, pri kiuj eblas diskuti. Prezentu aferojn similajn al tiuj, kiuj jam aperis en la (koncernaj) amaskomunikiloj (do eble kunportu ekzemplojn de vialingvaj artikoloj pri Esperanto kaj pri similaj temoj).
- Ni priparolos, kiuj temoj taŭgas por komunikoj kaj kiuj ne, kaj kiel krei eventojn, ekzemple prelegojn, pri kiuj eblas gazetarumi (kp. en vikipedio: "Villa Kreuzberg").
- Necesos ankaŭ priparoli, kiel zorgi, ke post la seminario efektive okazu amaskomunikilaj rilatoj kaj publikigoj, por ke la trejniĝo havu praktikan rezulton. Ja laŭ mi indas danki al Ludoviko Zamenhof pro la permeso uzi lian lingvon – unu bela ebleco estas per nia kontribuo al lia vivocelo kaj interalie per nia zorga informado.

Pliaj informoj: http://www.esperantoland.org/dosieroj/SeminarioAmaskomunikilajRilatoj.pdf.

**Petro Baláž (SK – enkonduko plus unu pli longa sesio)**

## Modernaj komunikaj rimedoj

Esperanto bezonas adaptiĝi – al la nuna mondo, al la nunaj teknologioj, al la nuna vivritmo. Por tio necesas uzo de modernaj komunikaj rimedoj – ofte ni ĉiuj uzas ilin, sed eble ne tiom ofte ni uzas ilin efike kaj kun la celo antaŭenigi Esperanton. Jen prezento de kelkaj ideoj, kion, kiel fari kaj kion eventuale eviti, uzante la nunajn komunikilojn. Esperanto devas evolui, same informado pri ĝi – kaj ni uzu por tio ĉiujn niajn haveblajn rimedojn – ankaŭ tiujn, kiujn ni uzas ĉiutage por aliaj celoj.

**Stefan MacGill (HU – enkonduko plus unu sesio lunde)**

## Kiel agi internacie

Unue, ni esploros kial por nia movado gravas aktivuloj kapablaj labori internacie. Due, en kiuj partoj de nia aktivula strukturo ili trovas ago-terenon. Ni arigos kvalitojn kaj strategiojn utilajn por internacia laborado, kaj esploros, kial tia tereno aparte malfacilas, kompare kun landa aŭ loka agado. Ni esploros la utilon kaj riskojn de Strategiaj Planoj kaj similaj dokumentoj; kiel optimume krei kaj poste realigi ilin. Ni enfokusigos la gravecon de financa planado inkluzive de la trovo de ekstermovadaj monfontoj. Krome ni resumos la delikatan arton de lerta protokolado, kaj la utiligon de bonaj protokoloj. Ni tuŝos la komunik-rimedojn je dispono por permesi kunsidadon sen fizika kunesto. La enkonduka sesio celas starigi vastrigardan eniron al la seminaria temaro; aliaj gvidantoj enrigardos specifajn kampojn kaj demandojn ene de tiu temaro. La praktika parto fine en lundo estos plenumo de rol-ludo, en kiu la tasko estos krei kaj funkciigi kontinentan komisionon por disvastigi Esperanton tra tiu bone konata kaj profunde amata dudek-landa kontinento: Azanio.

**JEN PARADO DE L'AM':**



